FN PER ANC 47

n° 199 Marto 1999

# ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel.02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## ASSEMBLEE GENERALE DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE A SAINT LO (MANCHE)

Nous nous réunirons le **Dimanche 11 Avril à Saint Lo** . Nous appelons les espérantophones de Normandie à participer à cette réunion qui sera à la fois amicale et officielle.

Elle sera amicale car ce sera l'occasion de faire connaissance avec des amis ayant une idée commune. Elle sera officielle paceque nous devrons faire le point et envisager des actions pour qu'enfin soit considéré notre désir de faire progresser la langue internationale,- en particulier dans notre province.

Cette réunion est organisée pour la première fois par un groupe espérantiste de la Manche. Des espérantistes isolés dans ce département se sont regroupés pour fonder une association . Vous lirez dans ce bulletin les salutations et les invitations du Président de "Esperanto 50", Monsieur Morio. Ce nouveau groupe se fera aussi connaître aux habitants de Saint Lo en participant les 27 et 28 Mars au forum des associations.

Il est reproché aux espérantistes de vivre dans leur "tour d'ivoire". Ce reproche est injustifié car ce sont les grands moyens d'informations qui nous ignorent. Pourquoi le grand succès de l'Universala Kongreso à Montpellier n'a-t-il pas été mentionné par les grands médias ? (sauf par le journal "Le Monde", mais bien tardivement et après de nombreuses protestations) . Il semble que certains milieux,-convaincus de la nécessité d'une communication indispensable à l'échelle européenne-, rejettent l'idée d'une *langue commune* facile et démocratique et s'orientent vers l'idée d'une *langue unique* qui ne peut être que l'anglo-américain parceque la langue de la puissance économique la plus forte.
En somme: *"La Voix de son Maître"*

**"Non à la langue unique ! Oui à la langue commune !"**

C'est pourquoi les espérantistes devront intervenir dans la campagne pour les élections européennes. Lors de notre Assemblée Générale, nous devrons discuter des actions à mener auprès des différents candidats: remise d'un dossier sur l'Esperanto, interventions publiques dans les meetings. Nos interventions ne devront être ni agressives, ni maladroites mais nous devrons prévoir les arguments habituellement utilisés par les adversaires de l'Esperanto (langue artificielle, langue sans culture, tout le monde parle anglais etc...)

Au cours de notre réunion, nous devrons aussi renouveller notre conseil d'administration (estraro) qui a besoin d'"un coup dr jeune" car voilà bien longtemps que le Président Secrétaire (Pierre Pottier) et le Trésorier-Rédacteur (Pierre Quillaud) veulent "décrocher". Le Président du groupe de Saint Lo souhaite que cette manifestation soit une réussite; il a invité le Maire de Saint Lo . Alors soyons nombreux. Sur votre agenda, donnez priorité à cette réunion. Venez avec les membres de votre famille et même avec des amis !

Petro KIJO

*En raison de la préparation de l'Assemblée Générale, ce bulletin est surtout consacré aux rapports concernant la vie de notre association*

## PROGRAMO DE LA ĜENERALA KUNVENO

10 H- 11 H 30 Kunveno de la estraro
12 H- 13 H 45 Komuna tagmanĝo en Restaumarché (sendu aliĝilon antaŭ la 3a de Aprilo)
14 H- 17 H 30 Ĝenerala Kunveno en Kultura Centro Jean Lurcat
Morala raporto
Financa raporto
Raportoj pri Normanda Federacio (de UFE)
Eŭropa voĉdonado: niaj intervenoj
Renovigo de estraro. Elekto de novaj komitatanoj
Partneraj rilatoj inter Malsupra Sakcio kaj Normandio
Helpo por Grésillon

**Renovigo de estraro:** *Ni alvokas kandidatojn. Se vi deziras esti estrarano kandidatiĝu, skribante al Prezidanto Pierre POTTIER 21 allée des Roitelets 76190 YVETOT*

******************************************************************************

## FINANCAJ RAPORTOJ 1998

Union des Esperantistes de Normandie CCP 283 40 H

| RECETTES | | DEPENSES | |
|---|---|---|---|
| **Au CCP le 26/12/97 :** | **9658,73** | | |
| Cotisations | 3770,00 | Bulletins 195 à 198 | 3446,19 |
| | | Frais administratifs | 98,60 |
| | | Cotisation au GAE | 250,00 |
| | | A.G. Hérouville | 570,00 |
| | | Delegation de Tiĥvin (après l'U.K.) | 1500,00 |
| | | Total des Dépenses | 5864,79 |
| | | **Au CCP le 31/12/98** | **7563,94** |
| | 13428,73 | | 13428,73 |

******************************************************************************

Fédération Normande d'UFE (CCP 2348 06 C)

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Au CCP le 1/1/98 :** | **3882,72** | | |
| Ristournes sur cotisations | 0297,00 | Frais administratifs | 7,00 |
| | | **Au CCP le 31/12/98** | **4172,72** |
| | 4179,72 | | 4179,72 |

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**KULTURA ESPERANTO DOMO (Kastelo Grésillon)**

La kulturaj aranĝoj okazas kiel kutime en la kastelo, de la 24-a de Julio ĝis la 21-a de Aŭgusto. Kosto de ĉiu semajna staĝo: 180 F. Pro la malpermeso de la sekurkomisiono, la loĝado okazas ekstere de la kastelo (hoteloj, ferio-ĉambroj, kampadejo (ĉe la kastelo)
Por aliĝi, skribu al: Jeanine Vincent, 26 bis rue de Milngavie 49150 Bauge
Por loĝago, petu informojn ĉe Paulette Naulet Telefono kaj fakso : 02 41 82 55 22



*PAĜO DE LA JUNULARO*

## RAPORTO PRI INTERNACIA SEMINARIO

ESPERANTO JUNAS EN FRANCIO !

Ofte la plej malnovaj esperantistoj sin demandas: "Sed kie troviĝas la gejunuloj en Esperantio ? Mankas al ni freŝaj kaj energiplenaj gejunuloj por aktivi en la movado. " Mi pensas ke iom post iom nuntempe tiu situacio ŝanĝiĝas en Francio, kaj pli kaj pli ŝanĝiĝos en la estonteco, ĉar la junulara asocio JEFO pli kaj pli viglas de pluraj jaroj, eĉ se la rezultoj de tiu agado tre malsamas laŭ la regionoj. Tamen,oni povas konstati tiun progreson se oni konsideras la plej faman Esperanto-aranĝon por gejunuloj en Eŭropo, tio estas la I.S. (Internacia Seminario), kiu okazas ĉiujare ie en Germanio de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro, kaj kiu ekzistas de pli ol 40 jaroj.

Efektive en tiu IS, kiu fakte estas pli ĝuste festa kaj distra renkontiĝo ol teda kaj laboriga seminario, partoprenas pli kaj pli da junaj gefrancoj. Ili venas nun tiom amase, ke dum la ĵus pasinta IS, kiu okazis en Kassel, Francio estis la dua plej nombre reprezentata lando (post Germanio) kun pli ol 30 partoprenintoj, dum antaŭ 5 jaroj ĉeestis en IS apenaŭ 6 aŭ 7 izolitaj francaj gejunuloj Ĉi foje, mian 4-an IS-on mi partoprenis kaj deziras iom raporti al vi , kio okazis dum tiu ĉi aranĝo.

Unue, mi bezonis ĉirkaŭ 13 horojn por vojaĝi de Caen al Kassel, kiu troviĝas meze de la nuna granda Germanio, sude de Hanovro kaj oriente de Duseldorfo. Dum tiu sezono, ofte atendas nin neĝo en Germanio, sed ĉi-foje, la vetero estis milda kaj kvieta, sen pluvo nek neĝo, sed tamen kun sufiĉe frosta aero dum la lastaj tagoj. Ĉar mi estas nun malnovulo en tiu renkontiĝo, ekde mia alveno en la urba junulargastejo, mi jam povis ĝoje kaj tutkore saluti dekojn da multlandaj geamikoj kaj konatoj; kaj por la aliaj novuloj okazis, la unuan vesperon, la kutima interkona vespero pere de diversaj kaj amuzaj ludoj, sed tiun-ĉi mi maltrafis , samkiel la inaŭguron pro mia longa vojaĝo.

Rilate la disvolviĝon de la IS, oni devas scii, ke ĉiujare iu temo (dependeco ĉi-foje) estas pritraktata kaj studita kadre de diversaj prelegoj kaj diskutrondoj .Ekzemple oni povis aŭdi pri dependeco en amrilatoj (tiu prelego vere furoris) , dependeco lume de fabeloj, dependeco de la korpo, koro kaj tero, dependeco de dadaismo, dependeco de scipovo de lingvoj, ktp... Krom tiuj "seriozaj" prelegoj okazis ankaŭ multaj distraj programeroj: oni povis partopreni kursojn de rokdanco, de mimo, de tajĝiĉuan, de eksperimenta danco , ktp...Ĉar la vintro kutimas malvarmi en Germanio, plej ofte la programeroj okazis interne, tamen estis organizitaj kiel kutime unu duontaga ekskurso al la parko Wilhelmsh"he kaj unu tuttaga ekskurso al la kastelo de Wartburg (tre bele ornamita kaj dekoraciita) kaj al la urbo Eisenach, kie troviĝas la naskiĝdomo de la komponisto J.S.Bach. Alia tradicia ekskurseto estas la Novjara promenado la 1an de januaro por tiuj kiuj sukcesas vekiĝi kaj moviĝi post la silvestraj bufedo kaj balo, kaj do plej ofte sendorma nokto.

Por fini tiun priskribon, mi kompreneble devas paroli pri la I.S.vesperoj, kiuj estas okazoj por elmontri kulturajn programojn. Oni povis spekti ekzemple bardan vesperon, dum kiu diversaj muzikantoj aŭ muzikistoj ludas kaj kantas unuope, duope aŭ plurope, sed ankaŭ teatraĵon kaj sorĉadon de iu magiisto, klasikan koncerton dum la unua vespero de la nova jaro, rokkoncerton de la fama grupo "Persone" kaj fine la internacian vesperon dum kiu ĉiuj partoprenantoj de la IS rajtas prezenti ion , muzikon, teatraĵeton, skeĉon, poemon ktp. Kaj por komplete rakonti pri tiu renkontiĝo, mi nepre devas precizigi ke por ĉiuj noktemuloj kiuj ŝatas resti veka dum la tuta nokto ekzistas ĉiufoje la diskoteko kaj la ĉiama trinkejo sed ankaŭ la fama Gufujo kie neniu rajtas fumi nek trinki alkoholaĵojn , sed kie oni proponas nur teojn, infuzaĵojn kaj dolĉaĵojn en tre trankvila ejo kun mildaj lumoj kaj muzikoj. Nokte eblas ankaŭ aŭskulti literaturaĵojn aŭ spekti filmojn.


Mi ĉesigas nun tiun priskribon, kvankam mi certe forgesis rakonti pri iuj okazaĵoj kaj mi deziras konkludi skribante , ke ĉiam mi spertis tre afablan kaj amikeman etoson dum la IS kiujn mi partoprenis, sen iu ebleco por enui. Plie, kutime ĉio estas bone organizita sed nenio estas pompa aŭ tro serioza. Resume : estas ideala etoso por gejunuloj . Ĉi-jare , ni estis prekaŭ 300 personoj, sed jam okazis IS kun 400 ĉeestantoj. Konklude, restas al mi forte konsili al ĉiuj gejunuloj , aŭ spirite junaj homoj, iam partopreni en IS en Germanio, kaj venontnovjare estos speciala I.S., ĉar okazos

la fama transiro al la jaro 2000. Tiu Internacia Seminario okazos en Wetzlar, en centra Germanio kaj multaj surprizoj atendos vin tie. Se vi deziras aliĝi, vi jam povas kontakti min aŭ vian esperanto-grupon, se vi trovos tie aliĝilon

Yves BACHIMONT
106 rue d'Orléans 14000 CAEN
Tél. 02 31 75 15 74
Ret : vivakvo@aol.com

Itala Esperantista Junularo organizas la **23-an Internacian Junularan Festivalon** ĉe mara hotelo "Ambasciatori " en Rimini Italio de la 31a de Marto ĝis la 6-a de Aprilo 1999

Ne manku la **gastronomiajn semajnfinojn organizitajn de JEFO**
- Fromaĝa apud Montbéliard de la 2a ĝis la 5a de Aprilo
- Oliva apud Perpignan de la 25a ĝis la 27a de Junio
- Vinbera apud Karlsruhe de la 10a ĝis la 12a de Septembro



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) organizas la **55an Internacian Junularan Kongreson** de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 1999 en Zànka Hungario

*******************************************************************************************
Vi povas ankoraŭ aliĝi al jenaj kongresoj:
**SAT Amikaro** en Glay (Doubs) de la 3a ĝis la 5a de Aprilo
**Fervojistoj** en Le Mans de 8a ĝis 15a de Majo kaj poskongreso en VVF de Colleville 15/18 de Majo
**Sennacieca Asocio Tutmonda** de 24a ĝis 31a de Julio en Karlovy Vary (Karlsbad)
**Universala Kongreso** de 31a de Julio ĝis 7a de Aŭgusto en Berlino
*******************************************************************************************

## L'Anglais langue unique de communication

Alexandre Adler Directeur du "Courrier International " a posé dans Ouest France la bonne question: "l'Europe à l'heure de l'Euro a-t-elle besoin aussi d'une langue commune?" Pour lui, ce sera l'anglais. Quelle idée originale! Voilà des dizaines d'années, et de plus en plus, que la plupart des élèves de l'Europe entière, l'apprennent avec des résultats très décevants, malgré de bons profs et un environnement culturel de plus en plus américanisé. Pourtant combien d'entre nous parlent couramment l'anglais sans trébucher à chaque phrase? Contrairement à la légende , alimentée aujourd'hui par A.Adler, l'anglais n'est pas une langue facile à apprendre; peu de gens la maitrisent convenablement en France, en Europe et dans le monde entier.
Alexandre Adler nous dit qu'on peut parfaitement maîtriser 2 langues, c'est vrai : mais après de longues années d'études acharnées et des séjours linguistiques prolongés, ce qui reste hors de portée pour la plupart des budgets familiaux. Là encore le fossé social et culturel se creuse; la loi du plus fort, du plus riche, dénoncée par Adler, s'impose. N'investir , en vain, que dans l'anglais équivaut à rester pieds et poings liés aux Etats Unis dont pourtant Adler rejette la suprématie.
Les responsables européens doivent en la matière faire preuve de sagesse et de discernement en ne mettant pas tous les oeufs (les notres) dans le même panier. D'autres voix s'élèvent pour préconiser un enseignement multilingue (Claude Hagège, Umberto Eco)). L'Esperanto est aussi une des solutions à envisager.
L'Espéranto, je le sais pour le pratiquer, relève le défi de la langue dans le respect des langues et des cultures. Il sert un idéal de solidarité entre les peuples, et non pas de confrontation de bloc contre bloc que M.Adler constate sans pourtant le dénoncer.
Pour notre avenir européen, et au delà, tout en continuant l'enseignement de l'anglais, développons l'enseignement des autres langues, dont l'Espéranto. Laissons leurs chances à toutes les alternatives.

Yves NICOLAS

Article envoyé à Ouest France en réponse à l'interview de Adler
*******************************************************************************************
**A.G. de Saint Lo: Repas en commun:** Envoyez votre inscription avant le 3 Avril